WIKIPEDIA

Navaha lingvo

La **navaha lingvo** (*Diné bizaad*) estas atabaska (na-denea) lingvo parolata plejparte en la Navaha Nacio, en nordorienta Arizono kaj nordokcidenta Nov-Meksiko (Usono); ĝi estas prave rigardebla kiel unu el la apaĉa lingvaro. La navaha lingvo estas parolata de pli ol 150 000 homoj, kaj (kontraste al plej multaj usonaj indiĝenaj lingvoj) tiu nombro aktuale kreskas.

Gravas por signifio de la unuopaj vortoj la melodio (sonnivelo) de la parolo. Ĉe substantivoj gravas, ĉu ĝi signifas vivaĵon aŭ senvivaĵon. Oni dividas la vivantojn je parolantoj (homoj) kaj venigantoj (bestoj kaj plantoj), la nevivantoj povas estis korpaj aŭ spiritaj.

La navaha gramatiko konas la kvaran personon, kies funkcio estas, ke oni povu aludi je persono, kiu ĉeestas aŭd-distance (oni trovas malĝentila personan mencion kun nomo). Al la maskla genro apartenas la statikeco, al la femala genro apartenas la aktiveco, ekzemple penso, ideo estas vira, dum parolo estas virina.

En la dua mondmilito la usona armeo utiligis navahalingvanojn por paroli kvazaŭ ĉifre, ĉar la malamikaj armeoj ne disponis pri scipovantoj kiuj povus traduki la mesaĝojn.

Eksteraj ligiloj

- Navahoaj ĉifroparolantoj de Arizono (1941-1945) (http://katalogo.uea.org/index.php?inf=5390) - el la katalogo de UEA-Libroservo
- Navaha Vikipedio (https://nv.wikipedia.org/)

Navaha lingvo

Diné bizaad



Teritorioj kun signifa nombro de navaha-parolantoj

Parolata en	Usono, Arizono, Nov-Meksiko
Parolantoj	169 369
Denaskaj parolantoj	proksimume 178.000
Skribo	latina
Oficiala statuso	
Reguligita de	Navajo Language Academy
Lingva statuso	2 vundebla
Lingvaj kodoj	
Lingvaj kodoj	
ISO 639-1	nv
ISO 639-2	nav
ISO 639-3	nav
SIL	NAV
Glottolog	nava1243
Angla nomo	Navajo
Franca nomo	navajo
Vikipedio	

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Navaha_lingvo&oldid=4997000"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 00:16, 9 mar. 2013.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.